# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO



**Aŭtoro de Esperanto**
**D-ro L. L. Zamenhof**
**(1859—1917)**

*Gravuraĵo de Reto Rosetti*

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS
25, Rue Gambetta, 62-NOYELLES-GODAULT. Tél. Hénin 20.23.32

Kotizoj (kun bultenservo)
Junuloj : 1 F ; Aktiva Membreco : 3 F ; Subtenanto : 5 F

FEDERATION ESPERANTISTE DU NORD DE LA FRANCE
17, Rue des Bouvreuils, 62-ARRAS C.C.P. LILLE 517-15

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, 62-CALAIS.

Informilo n-ro 2 — Marto-Aprilo-Majo-Junio 1967

## *Eĥoj pri la 59-a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO en KALEZO*
## *12/15-a de Majo 1967*

*Ĉeestis pli ol 150 el 8 landoj. Dimanĉe matene, la 14-an de Majo okazis laborkunsido de U.F.E. en la ĉelsalono de la urbodomo.*

*En sia festparolado, D-ro ALBAULT akcentis pri la utileco de Esperanto en la kulturaj interŝanĝoj kun eksterlando.*

*Je tagmezo, en la edziĝosalono, la kongresanaro estis oficiale akceptata de la Deputito-Urbestro, S-ro Jakvo VENDROUX, Prezidanto de la Komisiono pri Eksterlandaj Aferoj ĉe la Parlamentejo, en ĉeesto de : S-roj Paŭlo ZERKOWITZ, Vicprefekto ; MOULIN, Vicprezidanto de la Ĉambro Komerca k. Industria ; Karlo BEAUGRAND, Vicurbestro ; Luciano PICKAERT, Akademia Vicinspektoro, Moŝto BIGOURD, eksĉefadvokato ĉe la Ordeno de la Advokatoj en ST-OMER ; Ĝilo BARAS, Prezidanto de la Kultura Centro Kalezia ; DUHEM, el la departementa fako de Federacia Unuiĝo de Eksbatalantoj ; Klaŭdo REMBOTTE, Administranto de la Festokomisiono ; ktp.*

*Per familiara stilo apogita de spritaĵoj, kiuj kreis amikan etoson kaj degelis la kutiman rigidecon de protokolo, S-ro VENDROUX eldiris sian bonvenparoladeton.*

*"Se necesus elmontri, ke Esperanto estas utila ilo, tion oni konstatus per la fakto, ke tre embarasita mi estas... ĉar ne sufiĉe da konstanteco k. laboremo mi havis, ĉe kolegio, por sekvi la kurson al kiu mi enskribiĝis".*

*S-ro VENDROUX direktis bonvenigajn vortojn al ĉiuj k. esprimis sian dankemon, ĉar urbo KALEZO, eŭropa turnoplato, estis elektita kiel kongresurbon.*

*"Tio estas gesto kaj amika, kaj de komuna saĝo... Normale estus, se ĉi tie oni kutime parolus Esperante".*

*Post ĝentilaj vortoj al la iniciatintoj de tiu kongreso, li konkretigis siajn dirojn, donacante malofte atribuatan distingaĵon : la plateto pri urbo KALEZO, al S-ro LLECH-WALTER, Prezidanto de UFE.*

*D-ro ALBAULT resumis Esperantlingve por la eksterlandanoj, kaj sekvis varma aplaŭdado.*

*Poste venis la parolvico de S-ro ZERKOVITZ :*

*Senkulpigante la Prefekton, ankaŭ li eldiris sian bedaŭron, ke li ne alparolas en Esperanto "lingvo kiu, laŭ kion mi ĵus aŭdis, ŝajnas al mi tre belsona"...*

*"Bedaŭrindas konstati, ke ankoraŭ ekzistas baroj kontraŭ la vasta disvastiĝo de Esperanto, kiu lingvo akcelas la interkomunikadon kaj ebligus interkompreniĝon... mi eldiras la esperon, ke tiu lingvo, ŝajne uzebla de la tuta mondo, pli vaste propagiĝu, ol ĝi faris ĝis nun".*

*Videble emociita, S-ro LLECH-WALTER respondis al ambaŭ oratoroj, dankante la urbestron pro la belega plateto kaj la maniero laŭ kiu la kongresanoj estis akceptataj. Neniam antaŭe li venis en KALEZON sed, en jaro 1940-a, militkaptiĝinta en nia departemento, li povis konstati la bonkorecon de ĝiaj loĝantoj. Antaŭ ol esti forsendita al Germanujo en militkaptitejon, li povis pluvivi nur dank' al tio, kion li ricevis de ili. La Prezidanto de UFE fermis sian paroladeton per franclinvgva kvarverso dediĉita al la kataluna sardano, kio, en ĉeesto de apudmaraj loĝantinoj vestitaj en sia loka kostumo, aldonis plian folkloran noton al tiu kunveno. Li donacis al S-ro VENDROUX la Esperantan volumon pri kiu ĉiuj esperantistoj fieras : "La Dia Komedio" de Dante.*

*(varma aplaŭdado)*

=========================

Eltiraĵo el la parolado de S-ro PICKAERT, Akademia Vicinspektoro ĉe la bankedejo :

"Mi lernis la francan, la malnovgrekan, la latinan... en frenez-iga programo, neniam troviĝis iu, kiu juĝus necese lerni lingvon, kian via, paroli lingvon uzatan de milionoj da homoj... UNIVERSALAN LINGVON, KIUN NI HAVAS SUB LA MANO..."

"Jes ja, nuntempe ekzistas cirkulero, kiu permesas la instruadon de Esperanto - sed tiel sendependemaj estas la Francoj, ke ili ne aplikas tiun permeson..."

S-ro PICKAERT aldiris : "Mi pensas, ke vi devas entrepreni aparte efikan agadon : sukcesi tion, ke Esperanto fariĝu ne plu "permesata" sed konsilata lingvo por la ekzamenoj."

"Certiĝu pri tio, ke kion mi diras al vi, tion tutkore mi deziras, ĉar, kvankam mi ne lernis Esperanton, S-ro Prezidanto, mi celas la saman idealon kiel vi . Esperanto respondas la deziron komunan al ĉiuj popoloj pri interkompreniĝo.

"Mi deziras la enkondukon de Esperanto en la lernejajn programojn. Mi havas la konvinkon, ke ĝi alportus al la infanoj pli da ebloj.

... Esperanto nepre fariĝu OFICIALA AFERO. Kial ne ankoraŭ farite ?

"Vi havas nun ludotan karton... Kredu min, tio ne estas post-bankeda ideo. La plilongigo de la lernotempo ankoraŭ ne estas en ordo. Mi fidas Esperanton... Grava parto el la universitatanaro favoras..."

La Kaleza Kongresa Komitato multe dankas la federacianojn, kiuj per sia ĉeesto helpis al la sukceso de tiu kongreso.

---

Promocio : Ni plezure eksciis, ke la Ĝenerala Sekretario de NFEF, S-ro Fernando DITACROUTE, fariĝis administrarano de UFE. Gratulon ! S-ro LLECH-WALTER fariĝis Honorprezidanto de UFE. Anstataŭos lin kiel funkcianta Prezidanto D-ro ALBAULT.

---

KVINA MARKOLA KONGRESO

Ĝi okazis en Kalezo, je Pentekosto, je la sino de la 59-a Franca Nacia Kongreso de Esperanto.

La laborkunsidon, sabate vespere je la 20-a en t.n. "Kafejo de la Teatro partoprenis :

Por S.O.E.F. : S-roj ATKINSON k. PLATH, el Londono ;
Ges-roj HAWKER el Folkstono ; S-ro WATSON el Norwich ;
S-ro WOOD el Doncaster ;
Por Nederlando : S-ro PILGER el Zaandam (Nord-Holando) ;
Belgujo : Bedaŭrinde, pro samtempa okazigo de Belga Nacia Kongreso, neniu povis reprezenti Belgujon, sed la ĉeestantoj salutis la amikan B.E.F. esperante, ke pli oportuna aranĝo estos ebla en la venonta jaro.
Por N.F.E.F. : S-roj ODENT el Arras ; GILOTEAUX el Croix,
LEGRAND el Roubaix ; DOYELLE el Bourbourg.

La elektitaj respondeculoj estas por la venonta jaro :
Por S.O.E.F. : S-ro G.B. ATKINSON, 37 Mill Hill Road, LONDON W 3.
Por N.F.E.F. : S-ro G. ODENT, 17, rue des Bouvreuils, 62-ARRAS.

Por B.E.F. ; ĉiuj esperas, ke S-ro MARMENOUT, el Blankenbergo, povos plu okupi la postenon, se ne, ke B.E.F. bonvolos konigi la nov-elektiton.

Ĉiuj esprimis poste sian vidpunkton pri la "Markola Afero" :

I - Teritorio : Unuanime estas decidite, ke la Markolo estu la geografia centro de la organizaĵo, kiu nomiĝu simple "Federacio Markola" (laŭ propono de S-ro PLATH).

La estraranoj loĝu, pro oportuneco, proksime al tiu Markolo (tio estas nerealigebla nuntempe) sed ĉiuj interesatoj el la najbaraj landoj estu membroj, laŭplaĉe. La agado elradiu el la triangulo : Dovro-Kalezo-Ostendo.

II - Kunvenoj : Ni strebu al interesaj programoj kaj, okaze de kunfandiĝo kun naciaj kongresoj, estu pli da aranĝoj por la Markolanoj. Ĉi tiuj, plie, estu, se eble, akceptataj en la sama hotelo, cele al pli bona interkonatiĝo kaj amikiĝo.

III - Venontjara Kongreso : Proksiman jaron, la Kongreso de la Markolanoj okazos apud Folkstono, principe la 26-an k. 27-an de Majo, t.e. : NE kun Nacia Kongreso. Ges-roj HAWKER estas komisiitaj pristudi ĝian efektivigon. Ni atentu tamen pri la partoprenaj eblecoj de la alilandanoj. Kontaktoj devos okazi inter la estraranoj por findecidi daton.

La partoprenintoj disiĝis Je la 22.45 h., kontentaj pri la plenumita laboro kaj esperante daŭrajn de nia plurlanda federacio.

La Kongresa Sekretario :

J. DOYELLE.

*ROTTERDAM ANSTATAŬ TEL AVIV*

*Pro la eventoj, la kongreso en Tel Aviv ne okazos. La estraro de U.E.A. decidis okazigi la universalan kongreson en Roterdamo (Nederlando), je la samaj datoj, t.e. de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto. Aliĝoj ĝis 17/7/67. Cetere, la aliĝoj por Tel Aviv validos por Roterdamo.*

*Interesuloj sin turnu al : U.E.A. - Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2 (Nederlando).*

*Proksima federacia renkontiĝo de N.F.E.F.*

*Ĝi okazos en Amiens, la 8-an de oktobro 1967. Bv. noti tiun daton !*

NIA VIVO :

ARRAS : Iniciate de la koncernaj E-kluboj, okazas kulturaj interŝanĝoj inter la urboj LEEUWARDEN (Nederlando) k. ARRAS.

La gazetoj "Heroldo de Esperanto" k. "L'Elan Poétique et Littéraire" aperigis Esperantlingvan poemon de nia amiko Sipke STUIT.

NI SEMAS KAJ SEMAS KONSTANTE...

En Arras, la 10-an de marto, S-ro STUIT helpate de S-ro ODENT funkcianta kiel "tradukaparato" (laŭ la vorto de la prelegisto mem) faris brilan demonstracion de la Ce-metodo ĉe la Seminario por estontaj ŝtatinstruistinoj. Post la fino de la konversacio la ĉeestintaj junulinoj, kiuj estis plej bone respondintaj (t.e. "forte, kuraĝe k. elegante") la demandojn de la profesoro, montris fortan interesiĝon pri la Internacia Lingvo.

Oni povas nun esperi bonajn sekvojn de tiu plej sukcesa vespero.

VALENCIENNES : "La Voix du Nord" publikigis tutpaĝan artikolon pri la klubo k. la 5 Esperanto-kursoj.

Sep lernantinoj de ges-roj LIGOT k. F-ino TOMIALOJE partoprenis en Calais konkurson pri deklamado k. kanto. Laŭreatinoj estis : F-inoj A. GOURGEOT, M. CHIAMPI, M. DUVANT, M. DURY, C. LENTZ, C. BELLEVILLE k J. FRONTY. Gratulon al la sukcesintinoj k. al iliaj sindonemaj geinstruantoj.

LEGEMULOJ...

Aldonu al la listo de prunteblaĵoj :

- La Bulteno Gepatra (kiun, ek de ĉi tiu jaro, la Federacio abonas).
- The BRITISH ESPERANTIST (jarkolekto 1966).

Raporto pri la federacia jarkongreso - LILLE 23/4/67.

Kvankam lastmomente informitaj pri la detala programo de nia foira tago en Lille pro la bedaŭrinda prokrasto de "Norda Gazeto", 50 federacianoj ĉeestis en la festosalono de la Komerca Foiro.

Neesperita sukceso, mi konfesas, dank'al la neĉesema ĉeesto de niaj ges-anoj, kiuj kutimas partopreni ĉiujn federaciajn renkontiĝojn.

Ili ĉiuj estu gratulataj, ĉar ili manifestis la forton de nia movado tra la obstakloj.

Do, je la 10-a k. duono, malfermis la kunsidon nia Prezidanto, S-ro ODENT.

Pro manko de tempo, S-ro DITACROUTE, ĝenerala sekretario, ne antaŭlegis la agadraporton por la jaro 1966, sciigante, ke ĝi aperos en la bulteno.

Aparte, li sciigis, ke li kandidatiĝis kiel komitatano de U.F.E. kaj salutis la ĉeestantaron je la nomo de S-ro GUILLAUME k. de nia nacia asocio. Kiel LKK-ano, li donis ĉiujn necesajn informojn pri la nacia kongreso en Kalezo Pentekoste, kaj esprimis la deziron ricevi multajn federaciajn aliĝojn.

S-roj STUIT k. GILOTEAUX, kiuj poste havis la parolvicon, longe informis nin pri multnombraj temoj : Crésillon ; libro : "Dorse kontraŭ la Muro" ; eldono de la "Preĝo sub verda standardo" laŭ la originala manuskripto de D-ro ZAMENHOF ; vizito al S-ro Gido MOLLET, Deputito-Urbestro en Araso, k. kulturaj interŝanĝoj inter Araso k. Leeuwarden (Frislando) ; Gastejo "Amikeco" en Araso ; federacia konkurso k. korektita eldono de la libro "Les Langues Internationales" ; starigo de Esperanto-budoj ĉe Universala Ekspozicio en Montrealo ; ĉe la Floralioj Internaciaj en Orleano ; ĉe Rotaria Kongreso en Nico - novaj libroj k. radio-elsendoj - Esperanto kiel 2-a oficiala lingvo de blindaj laboristoj ktp.ktp...

Pro la multnombraj pritraktitaj punktoj, estis necese fermi la kunsidon je la 12-a por la oficiala akcepto de la Foira Estraro k. daŭrigi la laboron post la bankedo.

S-ro CORDONNIER, Vicurbestro, anstataŭanta la Urbestron, S-ro LAURENT, salutis la kongresanojn K. kuraĝigis nin daŭrigi nian agadon favore al reciproka interkompreniĝo k. paco.

S-ro PICAVET akceptis nin, kiel Reprezentanto de la Foiro okaze de la aperitivo.

Dum la posttagmeza laborkunsido, la triono de la federacia konsilio estis renovigita : S-roj CURNELLE, DITACROUTE, DOYELLE, DUMARQUEZ k. GILOTEAUX finis sian mandaton. Ĉiuj denove kandidatiĝis. Ĉar neniu kandidato sin anoncis, ili estis plenvoĉe reelektitaj.

S-ro BONVOISIN forlasos la Federacion, kaj necesas lin anstataŭigi (ankaŭ kiel departementan sekretarion). Sekve, lia posteno vakas.

La kotizoj por aktivaj membroj (5 fr.) k. subtenantoj (5 fr.) restos senŝanĝaj, sed la propono de S-ro ODENT malaltigi la kotizon de junuloj je 1 fr. estas akceptita.

Turisman Servon interne de la federacio ni devos prizorgi. Sed, kiu okupiĝos pri tiu fako ? Neniu sin anoncas. En ĉiu grava urbo, devus esti turismaj delegitoj, pripensu tion, aldonis nia Prezidanto.

La lasta punkto de la tagordo : Vivo de la Grupoj, estis la okazo por prezenti la grupon de Valencieno kiel modelon pri aktiveco. Koncerne la bonan novaĵon pri la reviglîĝo de Lille-Esperanto, S-ro ODENT akcentis la neceson de kunlaborado inter la grupoj de Lille-Roubaix-Tourcoing por krei "metropolan grupon".

La partoprenantoj disiĝis post konsento rendevui en Amiens, la 8-an de oktobro.

Redaktis : Fernando DITACROUTE,
Generala Sekretario.

---

*ELSTARA MONDCIVITANO : Profesoro KASTLER*

*Profesoro KASTLER, fiziku Nobel-premio 1966, redaktis kiel Mondcivitano la jenan deklaron :*

*"Proklami sin MONDCIVITANO ŝajnas al mi hodiaŭ necesa sinteno en mondo, kies strukturoj estas transpaŝitaj.*

*"Mi travivis la dramon de la loĝantaro de la Alzaca landlimo disŝirita per du naciismoj ; k. mi komprenis, ke absurde estas senfine daŭrigi militnaskantajn disputojn.*

*" Franca civitano, mi opinias, ke mia lando devas helpi, per ĉiuj rimedoj pri kiuj ĝi disponas, la malpli evoluintajn landojn, kaj, ke ĝi devas sindoni por regnigi la etoson de konfido, kiu permesos haltigi la armilkonkuradon elklikigitan de la grandaj regnoj.*

*"Sciencisto, mi scias, ke la solvo de la problemoj, kiuj stariĝas antaŭ la sciencistoj de la diversaj landoj, estas la frukto de ilia intima kunlaborado. Kaj mi kredas, ke estas same sur la tereno de la teknikaj realigoj k. de la ekonomiaj temoj.*

*"En epoko dum kiam la liberigo de la nuklea energio disponigas al la homoj neimageblajn rimedojn por detrui, sed ankaŭ por konstrui, en epoko dum kiam ekiĝas la granda planeda aventuro de la homaro, mi opinias, ke la homa socio devas doni al si instituciojn je la terglobmezuro por haltigi militon k. malsaton naskitajn de la egoismo k. de la malamego.*

*" Homo, mi sentas min solidara de ĉiuj homoj ; k. mi pensas, ke ili devas unuiĝi por edifi trans la rasaj kontrastoj k. la ideologiaj kontraŭstaroj la homan civiton, kiun ni alvokas per ĉiuj niaj deziroj."*

*Alfredo KASTLER.*

AGADRAPORTO de N.F.E.F. - JARO 1966

FEDERACIAJ MANIFESTACIOJ - En Méricourt, la 27-an de Marto, ĉ. 30 ĉeestis nian printempan renkontiĝon aranĝitan de Ges-roj Van PARYS.

Nia Federacia Jarkongreso en Lille, la 8-an de Majo arigis ĉ 45 partoprenantojn (inter kiuj 6 eksterlandanoj).

En Valenciennes, la 9-an de oktobro, ĉeestis nian aŭtunan renkontiĝon 55. Ĝi finiĝis en Roeux, kie ni admiris belegan fotekspozicion k. spektis projekciadon de diapozitivoj.

NIAJ FEDERACIANOJ VOJAĜAS - Dum la somerferioj restadis en la Esperanto-Kulturdomo, Kastelo Grezijono : Ges-roj L. BOURGOIS, CNUDDE, GILOTEAUX, JOLY, LEGROS k. F-inoj LENEL k. TOMIALOJE.

Ges-roj LIGOT k. S-roj ROUZE - patro k. filo - partoprenis la U.K. en Budapeŝto. Survoje, ili rendevuis kun 5 germanaj esperantistoj el Düren, kiuj vojaĝis kun ili ĝis la hungara kongresurbo.

LOKAJ MANIFESTACIOJ - Valenciennes : Okaze de la 7-a datreveno de la ĝemeliĝo kun Düren, delegitaro da 8 esperantistoj el Düren (Fed. Resp. Germanujo) gvidata de S-roj JODOZY, Vicprezidanto k. SCHIFFER, Sekretario, vizitis siajn kolegojn en Valenciennes, sabate la 21-an de Majo.

Calais : ĉeka esperantistino, F-ino Maria MRAZOVA, muzikfrofesorino en Pilsen, pasigis kelkajn tagojn ĉe Ges-roj BUERICK post vizito de Kastelo Grezijono k. Parizo. Tio estis la okazo por amika renkontiĝo kun la kalezaj ges-anoj, antaŭ la pli... seriozaj kongreskomitataj kunvenoj !

Lille : la 11-an de decembro okazis ĝenerala kunveno celanta reviglígi la Esperanto-Klubon. La Membroj esploris la eblecon starigi "Norddepartementan Metropolan grupon" (Lille-Roubaix-Tourcoing).

Roubaix-Tourcoing k. Valenciennes : tiuj kluboj akceptis plurajn kongolajn esperantistojn, kiuj estas studentoj en Bruselo.

Lens : Okaze de la kongreso de la eksbatalantoj k. militviktimoj, Lia Advokata Moŝto BIGOURD prezentis recenzon pri la disvastigo de Esperanto. Rezolucio estis voĉdonita k. transdonita al la koncerna ministro.

INSTRUADO - En Valenciennes, 4 Esperanto-kursoj malfermiĝis ĉe la porknaba lernejo de Cariot, ĉe la porknabina lernejo de "la Plaine de Mons", en Roeux k. Lourches, kiuj arigis preskaŭ 50 gelernantojn, el kiuj 30 knabinoj.

Sukcese trapasis en Grésillon :

Ateston pri Kapableco : F-ino M.A. TOMIALOJE, S-ro Lucien GILOTEAUX.

Internacian ateston pri Kapableco : Ges-roj GILOTEAUX.

GAZETARA SERVO - En Kalezo, "Nord-Littoral" regule aperigas gravajn artikolojn kun fotoj. Ankaŭ "La Voix du Nord" raportas pri la kunvenoj de la loka "Kultura Centro Esperanto".

En Valencieno, la diversaj regionaj ĵurnaloj : "Le Courrier", "La Croix du Nord", "Nord-Matin" k. "La Voix du Nord" raportas pri la diversaj aktivaĵoj de la grupo.

"Elan" publikigas kronikon pri la lingvo internacia.

Raportis : Fernando DITACROUTE,
Generala Sekretario.

KONKURSO: La E-rondeto en ROUBAIX-TOURCOING organizas konkurson pri amuzaj anekdotoj. Libropremioj. Tekstojn (ne pli ol 50-liniajn) sendu al la delegito : S-ro Lucien GILOTEAUX, 3, Allée Béranger, 59-CROIX. (ne estas limdato).

DIVERSAĴOJ :

Radio : Ĉe la stacio Radio-Bruxelles, Alice VAN WALLEGHEM kantis du kantojn en Esperanto, la 27-an de marto 67.

La 3.000-a elsendo en Esperanto de Radio Varsovio okazis la 20-an de junio. La Belga Radio k. Televido prezentis plurajn elsendojn pri Esperanto. La Brita Radio B.B.C. (adreso BBC, bulgara sekcio (Esperanto) Londono, Britujo) disaŭdigos elsendojn vendrede 30/6, 28/7, 25/8 laŭ la ondolongo de 41 m., 25 m., 19 m., 31 m.

La venontjara belga Esperanto-kongreso okazos Pentekoste 1968 en Bruselo. Senpaga aliĝo por Francoj k. aliaj eksterlandanoj.

Amiens : La grupo "AMIENS-ESPERANTO" ricevis de la Amiena Kulturdomo profitajn kondiĉojn, kiuj ebligos al Ges-anoj ĉeesti ĉiujn spektaklojn.
Oni sin turnu al la loka sidejo : F-ino MAUCHIEN, 10, Rue de Noyon, 80-AMIENS (Tél. 91-60-80).

EUROPA UNUIĜO DE BLINDAJ LABORISTOJ.

**Teksto de la 4-a Rezolucio - En Bruselo, la 4-an de Septembro 1966.**

"Konsiderante, ke la sociaj temoj k. materialaj problemoj starigitaj pro blindeco ĉe Eŭropa Teritorio bezonas por Blindularo disvastigon de internaciaj rilatoj k. aliflanke la Blindularo ofte spertas grandajn malfacilaĵojn por lerni lingvojn pro malesto de Brajlaj libroj, aparte konsilas al ĉiu Instituto de Eŭropa Blindularo devigan instruadon de Esperanto.

"Tiu universala lingvo montris sian kapablon de duonjarcento k. ĝia facila asimilado certigas al Blinduloj eblecon ligi internaciajn amikecrilatojn, kies tuja profito estus komparo k. esploro pri praktikaj solvoj de Blindeco".

---

*ĜENERALA MOBILIZADO DE LA MONDCIVITANOJ*

*Sekve de la deklaracioj de la Ĝ.S. de Uno U. THANT, kiuj denuncas la danĝeron de 3-a mondmilito, la Internacia Registro de Mondcivitanoj alvokas ĉiujn Mondcivitanojn sin mobilizi je la servo de paco, por la postvivo de la homaro, ĝis kiam Tutmonda Aŭtoritato estu starigita por solvi la konfliktojn.*
*Adreso : Internacia Registro de Mondcivitanoj,*
*55, Rue Lacépède - 75-PARIS (5°).*
*N.B. : La I.R.M.C. (vd. la ĉisupran adreson) eldonas bultenojn en lingvoj angla, Esperanta, franca, hispana.*

---

*Bulteno ofsete presita de Centre National Espéranto-Office*
*9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, 45-ORLEANS, Francujo.*

---

*Le Gérant responsable : Lucien BOURGOIS,*
*25, Rue Gambetta,*
*62-NOYELLES-GODAULT,*
*Francujo.*